****************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO marto. 2006 (IC-8)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

=======================================================================

Springboard – Lingvolanĉilo projekto: Vidu la belegan hejmpaĝon de la anglaj E-lingvoinstruistoj: http://www.springboard2languages.org

ni povas bone vendi "nian eminentan varon", Esperanton kiel kapabloevoluigan lernobjekton. Se ni parolas pri Esperanto, oni komencas nin a'uskulti, kiam ni parolas pri tio, ke Esperanto povus plifaciligi la vivon de niaj junaj gelernantoj.

La homojn ja direktas siaj interesoj. (Vidu la 30.000 gejunulojn, kiuj ekzameniĝis ĝis nun en Hungario pri Esperanto, por akiri sian fakdiplomon. Kvankam nur 20.000 el inter ili sukcesis trapasi la ekzamenon, ili estas nia vivanta pruvo, ke ellerni esperanton oni bezonas nur 1/10-on, aŭ maksimume 1/5-on de la tempo bezonata por la alproprigo de malfacilaj, naciaj lingvoj.)

Ankaŭ vi povas aliĝi al la Internacia Laborgrupo, kies sola celo estas la disvastigo de la ideo kaj praktiko, ke Esperanto devus esti la unua fremda lingvo kaj kapabloevoluiga lernobjekto en la bazaj lernejoj. La lernadon de Esperanto sekvus du aliaj, naciaj, fremdaj lingvoj.
Tiamaniere la infanoj povus paroli almenaŭ mezgrade tri fremdajn lingvojn post la abiturienta ekzameno. La projekto baziĝas sur la lernadfaciliga rolo de Esperanto.
La Laborgrupo funkcios unue en eŭropaj - precipe en eŭrop-uniaj - landoj.
Se vi volus kaj povus partopreni la Laborgrupon, bv. sendi vian nomon, telefonnumeron, elektronikan kaj poŝtan adreson al zsofia.korody @esperanto.de

39-a ILEI-Konferenco.

La 39-a ILEI-Konferenco (25-29 julio 2006) okazos en Parma.
Temo de la konferenco: Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj.

La konferenco sesios en la Instituto Salesiano San Benedetto. Estas diversnivelaj tranokteblecoj en la konferencejo mem kaj en ties ĉirkaŭaĵo. La prezoj varias inter EUR 21,00 kaj EUR 75,00 (en tendo aŭ ruldomo 6,00 EUR, en amasloĝejo 3,00 EUR kaj memzorgado).

Aliĝkotizo varias inter 15,00 EUR kaj 70,00 EUR depende de la kategorio kaj loĝlando de la aliĝanto. Por mendoj atingantaj nin post la 1-a de majo 2006 oni devas aldone pagi EUR 40,00. Post la 1a de junio 2006 ni ne plu povos por vi mendi tranoktejon.

Oni planas komunan vojaĝon al UK post la konferenco.
Informoj pri la konferenco kaj aliĝilo estas haveblaj en hejmpaĝo de ILEI www.ilei.info aŭ en www.ukflorenco2006.it.

La firmao "Filmoj Imagu" estas ĵus fondita kaj atendas la oficialigon en Brazilo.
Sekve de subteno de kelkaj esperantistoj "Filmoj Imagu" nun realigas filmon el la libro Gerda Malaperis de Claude Piron. Oni jam filmis 9 ĉapitrojn kaj la ceterajn oni filmos en majo kaj. laŭ la plano, ĉio (filmado, muntado, surdiskigado, pakado, ktp) devos esti preta ĝis la mezo de junio.

La oficiala paĝaro estas http://www.imagufilmo.org, kie oni trovas informojn pri la projekto, fotojn kaj povas antaŭaĉeti la DVD-on.
Antaŭmendoj de la filmo "Gerda malaperis" estas fareblaj pere de la konto ĉe UEA: arep-z. La prezo por antaŭaĉeto estas 16 eŭroj + ( sendokosto: 6 eurojn). Ankaŭ alia ĝenerala financa subteno estas realigebla tra tiu konto.